GISTO, MAR-2007.

Georgo O. Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS

ttt-kongrua skribo.

EEEE

RISKO

Ne oldigxu, mi kutimas averti, kvankam mi ne posedas recepton por eviti tion. La memorigo taùgu por ke junaj homoj neniel trouzu sian korpon. Trejnigxoj jes, sed ene de prudenta limo. De iom da tempo mi perdis gravajn mueldentojn. Du semajnojn antaùe "paneis" la dekstra (lasta) flanko. Mangxi farigxis laboriga afero. Alvenis la tago decidigxi, kun risko, pri nova dentaro. Mi opciis enplanti du dentojn. Nun mi atendas resanigxon postkirurgian dum unu monato kaj poste ricevi finan kompletigon. Geparencoj jam submetigxis al tiu radikala sxangxo kaj kontentas pri la rezultato. Espereble ankaù mi, krom la alta kosto! Tial chi oldulo, dum multaj monatoj trenigxos laù lia banka saldo ebligos, plenumante la pagenda fakturo.

DEMANDO

Longan tempon antùe mi pensigis pri la kruela mortigado far Kanado contraù beboj de fokoj. Ne longe antaùe Gisto legigis pri la kontraùlegxa mortigado de balenoj, en la Suda Atlantiko far Japanaj sxipoj, laù denunco de Sea Shepherd. En ambaù okazis la peto, ke bonkoruloj adresu plendojn al la kanada ambasadejo en Brazilja kaj al sinjorino Marina Silva, Ministrejo pri la Chirkaùmedio, ke sxi faru chion eblan, ke najbaraj landoj helpu chesigi la chasadon de balenoj ene de protektata areo. Nun Gisto demandas la karajn legantojn: chu vi kompatis kaj leteris al la respektivaj instancoj? – Panjo kutimis instrui min, neniam mistraktu bestojn, ech ne insektojn, tiel Dio donos al vi longan kaj trankvilan vivon. Longan vivon mi jam ricevis. Plenan trankvilecon ja neniu gxuas post kiam honestaj, malrichaj homoj ne kapablas teni armilon, por sin defendi dum banditoj amase atakas kaj pafmortigas senkulpajn homojn.

MALKOHERA PUNO

Gekatolikoj, divorcitaj, ne plu rajtas al komunio. Demando rilate al chi puno, chu krimuloj, ech klerikaj pedofiloj estas konsiderataj senkulpaj ?

GISTO

Pro la altigxo de posxta tarifo mi decidis ke, kiu per sia cheesto gxojigas la ceterajn kompanojn dum Verdaj Kafoj, ricevos nian bultenon senpage; kiu preferas negi la plezuron al niaj diligentaj rondanoj, tiu ricevos gxin hejme sed sxuldos al mi po R$ 01,00, krom foraj logxantoj – Kutime mi pretigas 20 kopiajxojn. Restintajn numerojn mi poste ekspedas al elstare diligentaj samideanoj. Aldonajxo: Kiu ne konsentas kun mia decido (chu iom diktatoreca?), tiu bv manifestigxi, prefere skribe.

KOMENTO

Laù la Genezo, Dio diris al tiutempaj homoj:"Kresku kaj multobligxu kaj regu la Teron" – Laù gxenerala signifo de la vorto "regi" gxi signifas administri, kontroli. Tiucele la homoj devas plenkapable uzi sian inteligenton kaj sciencajn malkovrojn. El tio rezultas ke oni povas plani la familiograndon laù nia kapablo nutri kaj eduki la idojn.La Eklezio kutimas ne menscii la trian eron kaj kontraùstare preferas la **NE**-sekurajn antikonicipajn, naturajn rimedojn sed ne akceptas gastigi chiujn orfojn de vivaj neresponsaj patroj. Tiel la "sxafaro" proponas senlanigxon je la kostoj de aliaj homoj.

VIKTOR

Nia rapide progresanta junulo Viktor memvole prezentigxis por legi unu pagxan tekston de li elektitan, plenume al propono de chi-kolumno. Gxi estis sxerca teksto pri la malkovro de Ameriko. Oni povis observi gastojn che flanka tablo pintigi siajn orelojn, provante kompreni la enhavon. Brave, kara Viktor ! Ni daùrigu la iniciaton. - Kiu preparis ion?. Bonaj poezioj ne mankas. Parkerigu ! -- BONHUMURO.

MALLERTAJXO.

Sinjorino vizitas amikan dommastrinon. Che la adiaùo:

- Bv ne gxeni vin pro etiketa kutimo, estas nebezone akompani min gxis la elirejo.
- Ne. Tio tute ne gxenas min...(hi...hi...hi).